



Boletín

n° 438 Aprilo - Junio 2022



SEVILO
ĈEFURBO DE HEK 2023

Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 438

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: Ángel Arquillos López
Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero
Sekretario: Manuel Parra
Vicsekretario: Isidoro Ortega López
Kasisto: Jesús M. García Iturrioz
Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)
“ Ana Manero

Prezidanto HEJS
kaj voĉdonanto: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Karaj gelegantoj de Boletín,

La ĉefa temo de ĉi bulteno estas la okazinta HEK en la urbeto Comillas (Santander), kie ĉio estas arto kaj natura beleco, kaj kie dum kvar tagoj ni ĝuis kiel kutime amikan renkontiĝon post la pandemio, kiu malpermesis al ni vojaĝi kaj eĉ moviĝi kun libereco en niaj urboj mem. Finfine ni sukcese kunvenis kaj la programo efektiviĝis senprobleme de la komenco ĝis la fino, danke al la bona aranĝo de la komitata teamo, kiu elektis allogan kongresejon kun taŭgaj spacoj, kie konataj elstaraj geesperantistoj prelegis kaj prezentis novajn librojn, kaj kiel kutime, artistoj kiel Jomo kaj Georgo Handzlik kaj Saša Pilipovic ofertis gravan kulturan spektaklon en samideana etoso.

Mi jam, kunlabore kun la LKK de Sevilo laboras por okazigi la 81an HEK, okazonta de la 12a ĝis la 15a de oktobro 2023. Mia pozitiva sperto en la urbeto Comillas donis al mi ideojn por proponi al niaj gesamideanoj de Sevilo, kaj kiam ni kunsidos ĉeeste, mi certas ke ili konsentos. Kompreneble ni devas esti pli ambiciaj kaj profiti ne nur la belecon de la ĉefurbo de Andaluzio, sed la senlimajn angulojn de la urbejo kiuj brilas per propra lumo.

Ángel Arquillos
Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
Protokolo	3
Salutvortoj de la prezidanto de UEA...	5
80-a Hispana Kongreso de Esperanto	6
Salutvortoj de la prezidanto de HEF...	8
Elstaraj partoprenintoj	11
Pri grupoj kaj Asocioj	12
La Stranga Angulo, ĉapitro 5a	20
Internaciaj kongresoj	23
Poezia Angulo	24
Internacie, Miguel Fernández en la portugala	25
Tempo, Horloĝoj kaj Fervojoj	26
Tito Brandsma, unua esperantisto sanktulo	29
Iom da Matematiko (7)	31



PROTOKOLO

Ordinara Ĝenerala Kunveno, 1-a de majo 2022

La 1-an de majo 2022 je la 10:00 horo, laŭ kunvoko de la Prezidanto, okazis Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio en la kultur-centro El Espolón en Comillas, kadre de la 80-a Hispana Esperanto-Kongreso, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (3a oktobro 2021)
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2021
- 3.- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2021
- 4.- Informo pri la anaro
- 5.- Aprobo de la buĝeto por 2022
- 6.- Projektoj por la nuna jaro 2022
- 7.- Ĉu HEF aĉetu fortenejon
- 8.- Sugestoj kaj demandoj

Ĉeestantoj:

Ĉeestas la kunvenon 6 membroj de la estraro kaj pliaj 26 membroj de HEF. Entute, 32 individuaj membroj, 1 el ili reprezentata de la sekretario, kaj ankaŭ estas reprezentataj la Grupoj: Kantabra, Bilbao, Fuenlabrada, Madrida (Liceo), Liberano (Teruelo), Andaluza, Frateco (Zaragoza), Astura, kaj Ekstremadura.

1- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (3a oktobro 2021)

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 435. Oni aprobas ĝin unuanime.

2- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2021

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 437. La kasisto klarigas kelkajn punktojn. Oni aprobas ĝin unuanime.

3.- Aprobo de la raporto pri aktivaĵoj de 2021

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 437. Oni atentigas pri tri eraretoj kiuj bezonas ĝustigon. Kun tiuj ĝustigoj, oni aprobas la raporton unuanime.

4.- Informo pri la anaro

Datumoj je 08/03/2022

- Individuaj membroj (OM, DM, PM kaj HM): 190
- Kolektivaj membroj (KM): 13
- Entute (individuaj + kolektivaj): 203
- Novaj aliĝoj ekde 01/01/2021 : 11
- Malaliĝoj ekde 01/01/2021 : 22

Ni konstatas, ke la asocio ade malkreskas; la nombro de novaj membroj ne sufiĉas por kompensi la perdojn.

5.- Aprobo de la buĝeto por 2022

La buĝeto estis publikigita en Boletín numero 437. Oni aprobas ĝin unuanime.

6.- Projektoj por la nuna jaro 2022

Kreiĝis nova klubo de Esperanto en la Universitato de Sevilo nomata BARAKA, kun la celo diskonigi la lingvon Esperanton kiel universitatilon, tio estas, taŭga lingvo por la esplorado, la edukado, la servo al la socio kaj la realigo de internaciaj retoj; kaj kiel nehegemonian komunikilon, kiu faciligas la stariĝon de internaciaj horizontalaj rilatoj. La grupo de Guardamar del Segura estas tradukanta en esperanton la libron de Ricardo Codornú "12 cuentos", kaj petas kunlaboron por tiu tasko.

7.- Ĉu HEF aĉetu tenejon?

En la lasta Generala Kunveno alvenis propono, ke HEF aĉetu tenejon en Madrido aŭ en ĝia ĉirkaŭaĵo, por ebligi la kreskon de ĝiaj diversaj servoj. La sekretario iom esploris la prezojn de tenejoj en Madrido, en la kvartaloj Vicálvaro, Vallecas-villa, Moratalaz kaj Aluche, kun utila surfaco de ĉirkaŭ 6 m². La plej etaj prezoj troviĝas inter 17.000 kaj 24.000 eŭroj, depende de la faciligo aliri (ŝtuparo, lifto...), la faciligo proksimigi aŭton, ktp. En ĉiuj kazoj endus aldoni la elspezojn pri notario kaj formalizaĵoj, ĉirkaŭ mil eŭroj; kaj la imposto ITP: 6% (se ni sukcesos pruvi ke HEF ne devas pagi IVA). Kaj oni havus por ĉiam aldonan elspezon de 20 aŭ 25 € monate por la komunumo de posedantoj.

Iuj membroj opinias tiujn prezojn tro multekostaj, kaj volus koni prezojn en urboj apudaj al Madrido. Aliaj opinias ke 6 m² estas tro malgranda. La sekretario enketos pri prezoj en kelkaj apudaj urboj.

Ni voĉdonas ĉu aĉeti tenejon: JES: 17 ; NE: 3 ; sindetenoj: 6.

Ni voĉdonas la maksimuman totalan elspezon: 20.000 € : 14 ; 30.000 € : 1 ; sindetenoj: 12.

Do, ni decidus ke HEF aĉetu tenejon elspezante ne pli ol 20.000 €.

8.- Sugestoj kaj demandoj

- Necesas (re)nomumi komitatanojn A de UEA. En julio renoviĝos la komitato de UEA. Kiel landa asocio, HEF havas unu homon en tiu komitato, kaj endas reelekti. Oni petas kandidatojn, kaj sin proponas nur la nuna komitatano: Ángel Arquillos pretas plui. La kunveno elektas kaj dankas lin.

- Kiel tradicie, la 6an de aŭgusto okazos movada foiro dum la UK en Montrea-lo. Ángel prizorgos la tablon de HEF, sed li bezonos helpon...

- Oni petas la grupojn kandidati por organizi la Hispanan Kongreson de Esperanto en 2023. Principe, la Sevila Esperanto Asocio pretus organizi tie la venontjaran kongreson. Ni esperas povi konfirmi ĉi tion iam baldaŭ.

La kunveno finiĝas je la 11:00 horo.

Manuel Parra
Sekretario

SALUTVORTOJ DE LA PREZIDANTO DE UEA OKAZE DE LA HEK ĈE COMILLAS



Karaj organizantoj,

Mi treege bedaŭras ke pro miaj universitataj klasoj mi ne povis aranĝi esti inter vi en Comillas. Mi vidas ke kiel kutime vi havos riĉan kaj ĝuidan programon, al kiu mi estus dezirinta kontribui. Estis por mi plezuro povi helpi en la diskonigo de la hispana kulturo per subteno de projektoj pri la hispana literaturo dum la pasinta jaro.

UEA alte taksas la nivelon de la laboro de HEF por Esperanto, ĉar vi prezentis modelojn de laboro informa, universitata, biblioteka, literatura, arta kaj multe pli. Nome de UEA mi gratulas vin kaj deziras treege sukcesan Kongreson. Mi persone esperas ke mi povos daŭre kontribui al la laboro en via lando, kun antaŭĝuo partopreni aranĝon ĉeeste post ne tro longe, sed ankaŭ esperas vidi plurajn el vi aŭ en aliaj eŭropaj kongresoj aŭ en la UK en Montrealo. Malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj, ni antaŭvidas belan kaj signifoplenan Kongreson en kiu ne mankos brilaj artaj programoj kaj muziko kiuj certe nutros kaj distros vin!

Bonan kaj ĝojigan Kongreson!

Duncan Charters

HEF-Bulteno 438

80A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



La 80a Hispana Kongreso de Esperanto okazis de la 29a de Aprilo ĝis la 3a de Majo 2022 en Comillas, Kantabrio, Hispanio, organizita de KantEA (Kantabra Esperanto-Asocio), helpita de Hispana Esperanto-Federacio. La kongresejo estis la Kultura Centro El Espolón. La Loka Kongresa Komitato konsistis el Miguel Gutiérrez Adúriz (Prezidanto), Pedro Ullate López (Sekretario), Guadalupe Barcina Amézaga (Kasisto), Carlos Cordero Huecas (Rilatoj kun institucioj), Rafael Moncalián García, Rosa Santiago Mancebo kaj María Carmen Blanco Peña.

Estis 150 aliĝintoj el 12 landoj (ĝis la preparo de la kongreslibro). Funkciis abunda libroservo. Ĉirkaŭ la korto estis montrita la ekspozicio "Esperanto, lengua y cultura".

Programo

La plenumo de la programo ekestis la 29an de Aprilo per ekskurso al la kaverno El Soplao, kie per gvidita vizito la kongresanoj povis ĝui la kontempladon de belegaj stalaktitoj kaj stalagmitoj en groto malkovrita de ministoj meze de la 19-a jarcento. La 30an de Aprilo estis tago plenplena je interesaj prelegoj. Rafael Blanco priskribis la figuron kaj verkon de la eŭska poeto Gabriel Aresti. Lorenzo Noguero rakontis la ĉirkaŭveturadon de Ferdinando Magelano kaj Juan Sebastián Elcano, kiel la unuaj kiuj ĉirkaŭis la tutan mondon tra la nune nomata Magelana Markolo al Filipinoj kaj pluen al Hispanio. José Antonio del Barrio prelegis pri la figuro de la kantabra inventisto kaj

esperantisto Leonardo Torres Quevedo. Vicente Manzano parolis pri la supozata reguleco de Esperanto kaj la certaj ties neregulaĵoj. Miguel Gutiérrez Adúriz rakontis la historion de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj priskribis ties nunan situacion. Kaj Javier Alcalde disvolvis la historian rilaton inter anarkiismo (kaj ĝenerale la laboristaro) kaj Esperanto. Fermis la tagon koncerto de la fama okcitana kantisto-muzikisto JoMo.

La dimanĉo, la de Majo, startis per prezentado de du novaj eldonaĵoj, nome "Esperanto y esperantistas de Teruel - Esperanto kaj esperantistoj de Teruel" de Serafín Aldecoa; kaj "Lengua y utopía, el movimiento esperantista en España (1890-1936)" de Roberto Garvía. Dum okazis la Ĝenerala Asembleo de Hispana Esperanto-Federacio, Floreal Martorell parolis pri elementaj konoj pri sontekniko por spektakloj. En la kongresa inaŭguro diskursis la urbestro de Comillas, nome María Teresa Noceda, la skabeno pri kulturo, kaj la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, nome Ángel Arquillos López. Ana Manero prezentis la Projekton Lorca de HEF kaj ties ĵusaj rezultoj, nome la eldonado de bitlibro "Cigana romancaro" de Federico García Lorca kaj la libron "Omaĝe al Lorca" editorita de Miguel Fernández. Sekvis filma prezentado de kantabraj poetoj (originale kaj tradukite al Esperanto). Posttagemeze okazis kegloludado, kiel montro de regiona populara ludosporto, kaj ludado de la teatraĵo "Kabaredo Verda Banaan" fare de Georgo Handzlik kaj Saša Pilipovic.

Lunde la 2an de Majo Floreal Martorell parolis pri elementaj konoj pri organizado de spektakloj. Ana Manero prelegis pri la historio de libro ekde ties komenco ĝis la bitlibro kaj plu. Vicente Manzano esploris la sistemojn por fari demandaron. Georgo Handzlik koncertis. Ewa Grochowska finfine ne povis partopreni en la kongreso kaj tial ŝia planita posttagmeza prelego pri Aŭrovilo ne okazis. Anstataŭe Toño del Barrio organizis kvizon "Kiu volas esti milionulo?". Niko Voloshyn parolis pri karikaturoj kaj humuraj bildoj en Esperantujo. Kaj Saša Pilipovic fermis la tagon kaj la programon per koncerto.

Marde la 3an de Majo okazis tuttaga ekskurso al Santandero, Santillana del Mar kaj Altamira. La provincan ĉefurbon, nome Santandero, la kongresanoj atingis fakte per ŝipo, kio ebligis kontempli la golfeton de Santandero. Promenado tra la urbo kaj posta vizito per buso, ekzemple al lumturo ebligis pluan konatiĝon kun la urbo. Posttagmeze oni vizitis la mezepok-renesancan urbon Santillana del Mar kaj tuj poste la apudan muzeon pri la famaj grotoj de Altamira kaj ties kopion (la veraj grotoj jam ne estas malferme viziteblaj).

La 81-a Kongreso okazos en la bela urbo Seviljo en 2023.

El vikipedio surbaze de redaktado de Kani

SALUTVORTOJ DE LA PREZIDANTO DE HEF OKAZE DE LA 80A HISPANA KON- GRESO DE ESPERANTO “COMILLAS”

Al ĉiuj gesamideanoj, kiuj pro diversaj kialoj ne ĉeestis la kongreson, mi imagas ke multaj el ili scivolemas kaj deziras scii ion pri la evento, kaj volante mi transkribas mian etan prelegon, ĉar temas pri neforgesebla sperto okazinta en alloga konstruaĵo en la urbocentro kaj relative proksime de ĉiuj hoteloj, kio faciligis la ĉiutagan akuratan ĉeeston de ĉiuj bonŝanculoj, kiuj ĝuis la eventon. Bedaŭrinde per vortoj ne eblas priskribi la bonan etoson, sed kedu min, ni partoprenis kulturan kaj gajan eventon danke al veraj artistoj pri muziko kaj teatro kaj prelegantoj, kiuj parolis pri gravaj kulturaj aferoj kaj famaj esperantistoj. Mankis nenio kaj eĉ la vetero estis tre agrabla. Nun ni pretigas la venontan kongreson, kiu okazos en la belega urbo Sevilo de la 12a ĝis la 15a de oktobro, kie la vetero dum ĉi tiu monato estas agrabla, do ni atendas rekordan ĉeeston.

Jen la prelego:

Kunveni okaze de kongreso estas tre agrable kaj se la evento realiĝas en paradiza ejo, des pli bone. Mi jam trairis kaj esploris la urbeton kaj mi ne troigas se mi diras ke ni troviĝas ene de reala kaj vera paradizo. Tiel estas mia impresio de kiam mi sentis la blindigan lumon, kiu konstante eligas tiu mirindaĵo.

Dankon pro la bona ideo kongresi ĉi tie. Mi tre feliĉas, elkoran dankon.

La viruso perdis forton kaj ĉies timo dissolviĝas iom post iom, ĉar teni la distancon kaj surporti buŝmaskon jam ne plu estas deviga, do oni povas diri, inter citiloj, ke ĉio enordas, kvankam mi min demandas, dum kiom da tempo? ĉar nun la nova kaj plej grava viruso nomiĝas milito, stulta kaj nekredebla milito, kiu mortigas senkulpulojn kaj detruas urbojn pro terura kaprico de sangavida kaj mensogema danĝera diktatoro al kiu oni ne povas kompari eĉ kun la plej danĝera viruso. Ni kiel geesperantistoj estas neŭtralaj kaj pacemaj homoj, ĉar ni parolas kaj praktikas la lingvon de la paco, sed estas malfacile enteni sin en tia makabra situacio, kaj per la lingvo de la paco mi petegas stopi tiun sangan kaj kruelan militon.

Daŭros longe, tre longe ĝis kiam eblos rekonstrui tutan detruitan landon, kaj tiu amara memoro restos gravurita en la koroj de milionoj da familioj, kiuj nun mutiĝas kaj ploradas senĉese kontemplantante, kiel detruigis ne nur la vivo, sed la vivodaŭraj memoroj kaj la kaduka stato de la lando kaŭzita de infera kaj kruela bonbado. Ili perdis la estonton. Milionoj da gejunuloj, kiuj komencas vivi neniam forgesos ĉi tiun teruran koŝmaron, ili neniam kapablos forviŝi ĝin el siaj mensoj, ĉar ĉio ĉi restos por ĉiam en iliaj kapoj kiuj jam trafis iliajn korojn kiel dutranĉa sanganta glavo.

Ĉi terura sperto inspiris min verki poemeton:

Post la terura bruado
Venas la kalmo silenta
Sur la sangan batalkampon,
Kie jam neniŭ plendas.

Post la terura bruado
La grundo tute plenplenas
De pecetoj el ŝtalo
Miksitaĵ kun sango freŝa.

Post la terura bruado
La timo iĝas intensa,
Kaj ekburĝonas malamo
Sur la tereno malseka.

Post la terura bruado
Multaj homoj kune preĝas
Atendanta la miraklon
De ebla paco... mi kredas.

Estas tre agrable saluti geamikojn kaj bonajn gesamideanojn el pluraj partoj de nia geografio kaj eksterlande, kaj ne nur saluti, ĉar ankaŭ intersanĝi brakumojn, promenadi kaj diskutadi pri interesaj temoj, hobiaĵoj kaj progreso de nia lingvo. Estas grava momento por intersanĝi spertojn, ĉar multaj el ni renkontiĝas unu aŭ maksimume du fojojn jare danke al la okazigo de kongresoj kaj renkontiĝoj, kaj dum tiu longa periodo ja okazis multaj gravaj aferoj kiel: eldonado kaj tradukado de libroj pri Esperanto, retaj kaj ĉeestaj kursoj, radio-kaj televidaj intervjuoj, vizito de eksterlandaj gesamideanoj, kaj konferencoj ĉe la kutimaj kulturcentroj, ktp

Renkontiĝi estas necese kaj se tio okazas ĉe bela loko, des pli bone. Ĉi-jare ni certe trafis la ĝustan, la taŭgan kaj la plej allogan lumoplenan kaj buntan ejon. Ni ne perdu eĉ unu minuton por ĝui ĉi belan donacon ĉe la nordo de nia lando, ĉar la etoso estas bonega kaj ni devas kompletigi ĝin kvazaŭ ni troviĝus inter familianoj, kiuj parolas la saman lingvon kaj havas la saman senton.

Danke al la programo plenplena de interesaj programeroj, ni certe ĝuos belajn momentojn, ĉar ne mankas distraĵoj, belsonaj kantoj, filmetoj, ekskursoj kaj amuzaĵoj.

Malgraŭ la pandemio ĉio estis prokrastita, kaj la malbena ankoraŭ ne tute ĉesas kaj ni, spite de nia granda kuraĝo, ne kapablas venki ĝin definitive, tamen, feliĉe ni kapablas kunvivi kaj sentime, ni ja kunvivadas, sed singarde, kompreneble, ĉar la vivo daŭras kaj ne mankas iloj por batali kontraŭ la malbono de la 21a jarcento, kiu, senkompate invadas la teron.

Ni kunsidas kun la celo kaj bezono renkontiĝi kun geamikoj, kiujn de antaŭlonge ni ne vidas, kaj tio pormomente efektiviĝas kaj ankaŭ la venontaj projektoj efektiviĝos, kaj pri tio mi ne dubas, ĉar ni kiel kutime daŭre kunlaboras.

La lastaj du jaroj estis kvazaŭ koŝmaro kaj ne nur pro la pandemio, sed ankaŭ pro la vulkano, kiu ruinigis multajn homojn en kanaria insulo La Palma, kaj, kial ne menciigi la malĝojan neceson vendi la domon de UEA en Roterdamo, pro financaj problemoj?, ĉar okazas ke estas pli kosta la rekonstruado ol la aĉeto de nova domo en malpli riĉa lando. Laŭ mia scio, tio ankoraŭ ne estas solvita, Tamen la plej grava kaj terura afero estas la senutila milito, kiu mortigas kaj detruas senkompate ĉiajn vivantojn.

Ni jam pretas batali, sed ne sur la batalkampo, nia invado estas la lingvo, kaj ni certe sukcesos, ĉar nia ĉefa armilo estas la vorto, kaj nia gvidanto estas Esperanto, kaj nia moto estas Paco, do ni iru antaŭen ĉiam antaŭen, ĉar la verda lingvo naskiĝis ne nur por babilado kaj interkomprenado inter la homoj, sed por iamaniere, pere de la vera amikeco, pacigi la nestabilan mondon. kvankam tio ne estas tre facila afero, mi tion spertas de antaŭ multaj jaroj. Ne ĉiuj povas diri, mi havas geamikojn aŭ konatulojn en la tuta mondo, nur geesperantistoj havas la eblecon tion aserti kaj pro tio ni kunsidas hodiaŭ homoj de Esperantujo kun la celo saluti kaj konatiĝi kun novaj kaj eĉ renkontiĝi kun malnovaj gesamideanoj, lertuloj kaj komencantoj por plibonigi la lingvon, kiu ĉiutage kreskas, ĉar la akademio de Esperanto kontrolas kaj studas la novajn vortojn kaj aldonas kaj forigas la malnovajn, kaj tiel la lingvo restas vivanta kaj tiel ĝi moderniĝas kaj adaptiĝas al la nunaj tempoj.

Mi esperas kaj deziras ke la bona etoso daŭros de la komenco ĝis la fino de la kongreso, ĉar tiel estas nia kutima celo en ĉiuj kongresoj, kaj ĉiam sukcese kaj fruktodone finiĝas.

Ĉi tie ni havas la eblecon ĉeesti kaj partopreni la eventon laŭ nia bontrovo kaj profiti la tempon elektante laŭplaĉe niajn plej ŝatatajn programerojn, kiuj estas tre variaj kaj ĉiuj je nia dispono.

Mi certas ke mankos al ni tempo por enuiĝo, do ni profitu la okazon moviĝi pere de la freŝa energio akirita okaze de ĉi grava evento.

Dankon al ĉiuj, ĝuu la kongreson.

**MI DEKLARAS MALFERMITA LA 80-AN
HISPANAN KONGRESON DE ESPERANTO.**



ELSTARAJ PARTOPRENINTOJ DE LA HISPANA KONGRESO

Javier Alcalde



Rafa Blanco



José Antonio del Barrio



Vicente Manzano



Ana Manero



Lorenzo Noguero



Georgo kaj Saša



JOmO



Flo Martorell



Miguel G. Adúriz



PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

Malago



Nia juna samideano Jaime González el Bogoto (Kolombio), kiu de antaŭ pli ol unu monato loĝas en nia urbo kaj planas daŭrigi ĉe ni kun sia familio, kunvenis kun kelkaj membroj el nia Malaga grupo en la Kafejo Esperanto, kie ni bierumis en bona etoso kaj babilis dum unu horo pri diversaj temoj, inter ili pri la sukcesa pasinta hispana kongreso, okazinta en Comillas (Santandero).

Ni akceptis lin kiel membro de nia Asocio, kaj ni esperas ke li partoprenos niajn lundajn kunsidojn ĉe la kafejo Esperanto.

Sevilo

En Sevilo, laŭ la prezidanto de Sevila Esperanto Asocio, José Roldán, granda grupo de gesamideanoj jam pretas aranĝi la venontan Hispanan Kongreson, ĉar kun granda entuziasmo ili akceptis ĉi gravan eventon kaj entuziasme ili kunsidis kaj daŭre kunsidas por trakti la agrablan taskon organizi la ĉefan renkontiĝon de Esperantujo kaj ĉi-foje, la Universitato havos gravan rolon, ĉar la profesoro Vicente Manzano, multe laboras por instrui kaj disvastigi la lingvon inter la profesoroj kaj studentoj kun granda sukceso.



Nova klubo de Esperanto en la Universitato de Sevilo

Katalunio

Sabadell

VIZITO AL MARIA FERIGLE DANTI

Maria Ferigle, kiel multaj esperantistoj scias, estas la vidvino de Luis Serrano, la organizanto de la Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo dum 22 jaroj kaj María gaje apogis lin.

La 11-a de aprilo mi vizitis ŝin, ni ne vidis unu la alian de antaŭ kelkaj jaroj, ŝi jaraĝas 91, al ŝi mankas movebleco kaj ne foriras eksteren sed ŝi estas tre lucida kaj havas bonan memoron.

Ni parolis pri esperanto, la pandemio, la milito ktp.

Ankaŭ ni parolis pri la morto, ni ambaŭ konsentis ke la korpo diseriĝas sed la animo aŭ energio daŭros. Mi diris al ŝi: Imagu esperantistan feston en la estonte-

co kie ni renkontos denove milojn da bonaj esperantaj geamikoj, inter ili, Luis. Ni multe amuziĝis. María estas feliĉa virino.

Parolante pri la kutimaj ŝanĝoj dum la jaroj, ŝi diris ke dum ŝia juneco estis permesita preskaŭ nenion, nuntempe la junuloj estas tre liberaj, ŝi volus naskiĝi nuntempe. Ni ridis.

Ŝi petis al mi viziti ŝin denove kaj mi volonte vizitos ŝin meze de junio, post la 39a kataluna kongreso en Castelldefels por rakonti al ŝi la eventon.

Rosa López

Tenerifo

Nova prezidanto de ESTO

Mi estis elektita por la venontaj du jaroj la nova prezidanto de ESTO, Esperantista Societo de Tenerifo, en nia lasta enerala asembleo okazinta pasintan merkredon.

Kiel multaj grupoj, niaj membroj estas maljunaj kaj mi ne scias ĉu la grupo ankoraŭ ekzistos por jardeko, sed intertempe ni ĝojis esti kune persone post du jaroj kaj ni montris nian intencon kunveni po unu fojo monate en kafejoj alterne en Sankta Kruco kaj La Laguna por refortigi la interpersonajn ligilojn kaj, ĉu eble, paroli Esperanton.

Mia intenco kiel prezidanto estas uzi pli ofte la reton inter la membroj kaj kun aliaj asocioj, ĉefe kun grankanariaj gesperantistoj, purigi la membroliston (laŭ ĝi ni estas preskaŭ kvindeko... kiu montras nian pasintan sukceson... sed tio ne plu realas) kaj diskonigi nian ekziston al eblaj novaj kanariaj gesperantoj kiuj lernis rete kaj ne multe scias pri la kanaria movado.

Francisco Orta

HEF-Bulteno 438



Madrid

Fuenlabrado

CIVITANA PARTOPRENO EN FUENLABRADO

La grupo "Participación Ciudadana" (Civitana Partopreno) de la urbestraro de Fuenlabrada, Madrid, iniciate de la magistrato pri edukado kaj vicurbestro, Isidoro Ortega López, krome esperantisto, invitis la asocion Fuenlabrada Esperanto-Ligo partopreni la unuan prezenton de "interasocia" evento, okazinta la 21an de majo. Rerezentantoj de pli ol 80 asocioj kunvenis dum tago vestita de festa etoso, plenplena da aranĝoj celantaj precipe familiojn. La Parko de la Solidareco iĝis la kadro kiu enhavis multegajn kioskojn kie la diversaj asocioj de la urbo povis sin videbligi antaŭ la amaso da vizitantoj, jam alprokmiĝantaj ekde la fruaj matenaj horoj en la sabato. Niaj samideanoj okupis kioskon similan al tiuj de la ceteraj, kaj same ol tiuj ĉi, havis la ŝancon saluti kaj informi kaj plenkreskulojn kaj infanojn; kaj normalajn civitanojn kaj kelkajn magistratojn kaj foir-organizantojn. La simpla kiosko kovriĝis per esperantaj flagoj sub kiuj ne malpli ol 30 eldonaĵoj diverstipaj anoncis al la interesiĝantoj ke Esperanto vivas kaj utilas.

Oni soleme transdonis simplan donacon al F.E.L. memore de ĝia partoprenado en la foiro



LEGOKLUBO KAJ ALIAJ AKTIVAĴOJ DE FUENLABRADA ESPERANTO-LIGO

La 7an de aprilo la esperanta klubo de Fuenlabrada (FEL) okazigis la unuan sesion de nova iniciato: legoklubo. Ĝi estas gvidata de nia samideano Laura Higuera, mem verkistino.

La iniciaton oni ripetos ĉiujn monatojn. Oni proponas tekston antaŭe, kaj oni komentas ĝin kune. La loko estas la sidejo de la asocio, en la CEPA Paulo Freire, strato Creta 2 de Fuenlabrada, apud stacio Fuenlabrada Central. Vidu la priskribon kaj la proponon en la retadreso de FEL: http://www.esperanto.es/fel/?page_id=6124 kaj oni povas kontakti kun la respondeculoj ĉe: esperantoesdetodos@gmail.com.

Jen la prezento fare de Laura: «Estas por mi plezuro prezenti la unuan sesion de la Legoklubo “Fuenlabrada Esperanto-Ligo”. Mi pensas, ke legado en lingvo, kiun neniu trudiĝis al ni, estas unu el la plej altaj niveloj de libereco. Legado estas necesa kaj bela elemento por pliboniĝi en la lernado de iu ajn lingvo. Oni ne nur havas la eblecon akiri novan vortprovizon danke al ĝi, sed ankaŭ disvolvas pli kritikan pensadon pri ĉio, kio ĉirkaŭas nin. Hodiaŭ, tiu kritika kapablo ŝajnas eĉ pli ol iam necesa: la “realo” montras al ni en siaj sennombraj versioj kaj kun siaj senlimaj nuancoj, kun datumoj foje tro maĉitaj, manipolitaj kaj dolĉigitaj por nutri morbon. Engluti tiujn ĉi datumojn sen plua analizo, kondamnus nian penson al danĝeraj niveloj tipaj de plata elektroencefalogramo. Pro tio, lasi aliajn elektojn por ni kiel pensi estas, por diri almenaŭ, riskega pafo. Jen la kialo, kial mi konsentas kun Vargas Llosa: lerni legi estas la plej grava afero, kiu okazis al mi en mia vivo.»

La unua teksto komentita estis la rakonto “*Miaj prizonoj – Mia granda ŝanco*”, de Adem Demaçi, albano de urbo Pristina, en Kosovo. Temas pri rakonto kun versioj en 34 lingvoj, tradukitaj plejparte utiligante kiel ponton la lingvon Esperanton. En tiu ĉi okazo partoprenis la tradukisto de la rakonto en hispana lingvo, Manolo Parra.

La 26an de majo okazis la dua sesio de la Legoklubo. La invitito estis Jorge Camacho, kiu prezentis kaj komentis du siajn verkojn: la rakonton *Neniam plu (Aboco de Amo)*, kaj sian poemon *Miraklo*. Li ankaŭ komentis diversajn aspektojn de sia verkado. Jorge nutris nian menson kaj spiriton per la komento de siaj tekstoj kaj invitis nin longe debati pri liaj verkoj, kio estigis agrablan kaj lingve altnivelan etoson. Sen neceso de bisbisumo li volonte deklamis aliajn juvelojn liajn, antaŭ longe publikigitajn. Ankoraŭfoje, lia genia verko kaj persona kvalito kuraĝigis al pli ol unu el ĉeestantoj alproksimiĝi al tiu iom timiga areo nomiĝanta poezio.

La renkonto kun la legantoj estis filmita, kaj baldaŭ aperos en la reto.



Ni invitas vin ĉiujn partopreni la sekvajn Legoklubojn, pri kiu ni informos per la kutimaj kanaloj de la madridaj esperantistoj (retlisto, sociaj reoj, ktp).

Krome, ni atentigas ke la planoj de la fuenlabrada grupo ne finiĝas tie:

1- La programo nuna de Fuenlabrada Esperanto-Ligo estas...

- Ĉiusemajne kursoj baza kaj progresiga, inter la 17:00 kaj la 19:00 horoj, ĵaŭdojn.
- Ĉiusemajne: tuj post la kursoj oni surtabligas diversajn ludojn por praktiki nian lingvon.
- Ĉiumonate, la Legoklubo, gvidata de Laura Higuera, plu kunsidas por komenti E-tekstojn.

2- La programo planata estas...

- Kunkanti en Esperanto helpate de projekciaĵo kun Esperantaj tekstigitaj kantoj.
- Videokonferenci por kontakti aliajn E-klubojn.
- Deklami prozaĵojn kaj poemojn.
- Prelegi pri diversaj temoj

FEL ankaŭ pretigis alian iniciaton: aŭdkurson de Esperanto. La celo estas lerni la lingvon kaj perfektigi la parolan konon. Pro tio oni elektis la verkon «Gerda malaperis!» de Claude Piron, kiu prezentas rakonton kies lingvonivelo iom post iom kreskas laŭ la historio. Vi povas konsulti kaj aŭskulti en la adreso: http://www.esperanto.es/fel/?page_id=5568.

Por tiuj ĉi nunaj kaj estontaj aktivaĵoj ies ajn helpo estos ja bonvena!

Fuenlabrada Esperanto-Ligo

MADRIDO

DENOVE EN LA LEGADO DE DONKIĤOTO

La 21an de aprilo du esperantistoj partoprenis en la sinsekva legado de la verko Don Quijote, tradicie organizata de la Círculo de Bellas Artes de Madrido, finfine denove ĉeeste. Laura Higuera kaj Albert Stalin Garrido legis po pecon de la verko en la esperanta traduko. Vi povas spekti ilian legadon en la tŭitera konto de Madrida Esperanto-Liceo, respektive en jenaj adresoj: Laura ĉe: <https://twitter.com/LiceoMadrida/status/1518342571050868738> kaj Albert ĉe: <https://twitter.com/LiceoMadrida/status/151>



NOKTO DE LA LIBROJ EN MADRIDO

La 22an de aprilo estis festata la Nokto de la Libroj, kunvokita de la madrida regiona registaro. En la sidejo de HEF estis prezentata la libro “Lengua y utopía, el movimiento esperantista en España 1890-1936”, fare de ĝia aŭtoro, Roberto Garvía Soto, profesoro de Sociologio de la Universitato Carlos III. Kiel ni jam informis en pasinta Boletín, la verko estis eldonita de la Universitato de Granada, en kies retejo eblas koni pliajn detalojn, elŝuti la indekson kaj specimenon de la enhavo,

La evento estis prezentita de Félix Jiménez, prezidanto de Liceo kaj de Ana Manero.

Ĉeestis deko da homoj, kaj post la prezento okazis vigla kolokvo, kun diskutado pri la madrida movado en la 70aj-80aj de la pasinta jarcento

EŬSKIO

ESPERANTA POEZIO EN LA EŬSKA PARLAMENTO



Nia samideano Natxo Apaolaza partoprenis en la poezia iniciato "Poetoj en majo" (*Poetak maiatzean / Poetas en mayo*) disvolvita en la vaska ĉefurbo Vitorio en tiu ĉi monato. Konkrete, en la sidejo de la eŭska parlamento li deklamis poemon de Gabriel Aresti, tradukitan de Rafa Blanco (kiu cetere prelegis pri tiu grava eŭska poeto dum la Hispana Kongreso de Comillas). Vi povas spekti la partoprenon en jena video: <https://youtu.be/Ywl5krEw1Zs> (ekde minuto 8). Kurioze, la harpisto akompananta la deklamadojn, Hegoa Inchauspe, estas ankaŭ esperantisto.

VALENCIO

KURSOJ KAJ PRELEGOJ EN VALENCIO

La Grupo Esperanto de Valencio daŭrigas siajn aktivaĵojn por disvastigo de la internacia lingvo.

La 4an de aprilo ĝi organizis prelegon en la Fakultato pri Filologio, Tradukado kaj Komunikado de la Universitato, pri kiu zorgis Raúl Salinas, sekvitan de baza kurso de Esperanto, kun Dennis Keefe. Pluraj el la studentoj kaj profesoroj ĉeestintaj montris intereson daŭrigi la lernadon, por kio oni nuntempe pritraktas la detalojn.

Krome, la 6an de aprilo la valencia Grupo kunlabore kun la terŭela grupo Liberano



organizis prezentadon de la libro de Serafín Aldecoa pri la historio de Esperanto en Terüelo, en la Aragona Centro de Valencio, La prezenton faris la aŭtoro mem, post mallonga enkonduko en la lingvon, fare de Raúl Salinas.

KATALUNIO

PUBLIKIGITA LIBRO PRI ANARKIISMO KAJ ESPERANTO

EDICIONS MALCRIÀS D'AGRÀCIA

Quaderns Esperantistes 1



Esperanto i anarquisme:
els orígens (1887-1907)

JAVIER ALCALDE

Javier Alcalde ĵus publikigis "Esperanto i anarquisme: el origens (1887-1907)", pri la historia rilato inter Esperanto kaj anarkiismo. La verko (momente nur katalunlingva) estis eldonita de Edicions Malcriàs d'Agracia, en ĝia kolekto Quaderns Esperantistes, kaj estis unuafoje prezentita la 21an de aprilo en la Ateneu Llibertari de Gràcia, de Barcelono, kaj poste en la Hispana Kongreso de Comillas kaj aliaj lokoj.

La verko unuafoje prezentas rigoran kaj sisteman studaĵon pri la historiaj bazoj inter Esperanto kaj anarkiismo, el la utopiaj socialistoj ĝis Malatesta, tra Tolstoj, Pi i Margall, Reclus, Ramus, Landauer, Li aŭ Sakac. Oni povas legi pliajn informojn en intervjuoj kun la aŭtoro en Libera Folio kaj katalune en la retejo Cazabaret.

La stranga angulo

Ĉapitro 5a. Verkis Viko

Kiel filme instrui homojn, 1: divido de la homaro

Junaj plenkreskuloj alvenas al la universitato eble sentante, ke ili atingos altnivelan komprenon pri la mondo. Tian rezulton ili ne spertos. Universitato iasence stultigas. Tie oni ne atingas saĝecon per superrigardado de la Ĉio. Male, oni devas forlasi la komprenon de ia ĝenerala bildo pri la mondo kaj koncentriĝi atingi sukceson en iu el la pluraj kampoj de iu el la pluraj disciplinoj de la scienco kaj la profesio. Pli kaj pli socio estas konkureca. Kaj tion respegulas universitato. Por la celo venki en konkuro, oni devas forlasi ĉion krom tion, kiu malŝlosos la pordon de la dezirata individua estonteco. Rezulte, universitato fabrikas mensojn, kiuj multege scias pri malgrandeta io kaj reskaŭnenion scias pri la cetero. Do, kie aŭ kiel oni atingas tiun gravan bildon pri, kiel funkcias la mondo kaj kia ĝi estas? Respondo: per la filmaro. Ĉefe Holivudo instruas homaron. Holivudo ne nur estas la plej sukcesa instruilo. Ĝi ankaŭ estas profitdona. Oni povas iĝi riĉega danke al la negoco de la sepa arto. Ĉu vi deziras atingi tian rezulton? Do, bone, mi instruos vin. Kompreneble komenci ĉi tiun vojon bezonas iom da milionoj da dolaroj. Sed tio estas nur nuanceto. Do ni imagu, ke vi jam havas tiun minimuman kvanton da mono kaj deziras investi ĝin realigante sukcesan filmon. Mi nun ne opinios pri la kvalito nek merito de la sukcesaj filmoj, sed pri, kian mondon ili konstruas en la menso de la milionoj da spektantoj. Se vi deziras havi sukceson, imitu ilin.

Sukcesegaj filmoj estas tiuj, kiuj dividas la homaron en bonuloj (ekde nun, *B*) kaj malbonuloj (ekde nun, *MB*). Esence *B* kaj *MB* ne fabrikiĝas sed naskiĝas tiel. Do venki la Malbonon logike implicas mortigi la malbonulojn. Pluraj filmoj aldonas alian grupon. Temas pri la plejmulto el la homaro iel zorgata de *B*. Sed kiel uloj, neniu el ili valoras ion. La grupo similas al abunda sumo de minimumaĵoj (ekde nun *ASM*), kies grupa rezulto gravas. Kiel konstrui tian mondon? La respondoj estas la bazo de la monda holivuda universitato.

Jen vizaĝo, jen masko *B* havas vizaĝon. Ne temas nur pri fizika io, sed ankaŭ pri ĉiuj el tiuj karakteroj, kiuj klare substrekas "jen homo". Tiel *B* havas nomon, familion, historion. Male, *MB* kovras sian vizaĝon per masko kaj sian korpon per uniformo. Oni ne rimarku la homecon sub tia kovraĵo. La masko kaj la uniformo ne nepre estas fizikaj. Aliaj du rimedoj oftas. Unu el ili estas la neebleco fiksi la rigardon. Tio okazas kiam ili estas malproksimaj aŭ kiam la kamerao tro rapide okupiĝas pri ili. Male, pri *B*, oni povas eĉ rimarki larmetojn, kiuj malrapide falas glatante sur la vangoj. Eble vi respondos "En pluraj filmoj, ekzemple pri superheroo, la bonuloj alportas maskon". Jes, sed tio okazas nur en parto el la filmo.

En la cetera, li (aŭ malofte ŝi), demetas ĝin kaj montras sian nedubleban homecon.

Kaj jen emocioj

B kaj *MB* havas malsamajn emociojn. La unua grupo estas ne nur homa, sed ege homa. Ili ploras, ridas, kantas, dancas, sonĝas, timas. Sed sur ĉio ili kuraĝas kaj sekvas etikan vojon de sinofero.

Kelkaj momentoj el la vivo estas malfacilaj provoj. *B* sukcese trapasas la ekzamenon, ĉar lasas siajn individuajn emojn por la celo savi la grupon, eĉ la homaron. *MB* estas dividita en du grupoj, kerna kaj sekvantula. La kerna *MB* montras nur du specojn de emocioj: la revego kaj la kolerego. Ili revas havi povon, multe da povo. Kaj *MB* kutime koleras, mortigante eĉ siajn proprajn sekvantojn, konduto neniel neniam rigardebla en *B*. Kelkfoje *MB* ridas aŭ ridetas. Sed ne temas pri vera aŭ honesta rido, sed pri esprimo de la revo aŭ la kolero. La sekvantula *MB* estas nur kolekto de unuoj, kiuj iel ŝajnas vivaĵoj ĉar moviĝas. Eĉ ili ŝajnas homoj, pro la ekzisto de kapo, brakoj, kruroj... Sed la uniformo, la masko, la stulta obeemo, la afero ke ĉiuj el ili kondukas precize same...

Klare malhomigas ilin. Ili aperas kaj mortite malaperas same kiel herboj en kamparo, manĝitaj de bovinoj. Homoj ne ploras pro la malapero de herboj.

Malgraŭ viaj sonĝoj, vi estas ASM

Pri *ASM*, la rolo ege facilas. Ili mortas. Se ili mortas pro la konduto de *B*, temas pri akcidento. Se tia rezulto alvenas de la konduto de *MB*, temas pri intenca damaĝo, kiu rajtigas *B*-on agi, kiel *B* agas (vidu pli sube).

Nokte dormante la *ASM*-ano sonĝas, ke li (aŭ malofte ŝi) estas *B*, kvankam neniam dubas nek dubos, ke lia (aŭ malofte ŝia) grupo estas *ASM*. *ASM*-ano timas kaj malamas *MB*-on. Pro tio, *ASMano* envias sed bezonegas *B*-on, ĉar nur ĉi tiuj povas savi la mondon.

Tio estas malkomfortiga sento. Oni estos savita ne ĉar oni estas precize oni, sed ĉar oni loĝas en tiu anonima oniaro sinsekve savata de *B*. Malkomfortas danki ĉi tiel: "Dankon *B*. Vi ne scias pri mia ekzisto, sed vi savis min, ĉar vi savis la mondon, kie mi loĝas. Konsciente pri mia absoluta negraveco, rimarkante la abismon, kiu dividas vian necesan vivon de mia anstataŭindeco, mi dankas vin". Ho! Vere estas damaĝo! Kaj bonega instruo! Danke al tia mesaĝo, homoj lernas pri tio, kiu estas ilia loko en la mondo, neniel grava krom rilate al la apogo de la gravuloj.

Pere de la filmoj oni ne nur spektas la morton de samuloj, membroj de *ASM*, sed eĉ tia morto donas pozitivajn sentojn; ĝi liveras hormonojn, kio rilatas al la cerba funkciado de la plezuro.

La lingvo de la pugnoj

Kiam la Bono kaj la Malbono renkontiĝas, la komunikado postulas komunan lingvon. Ĉar la Malbono nur konas la perforton, nur kiam la Bono ankaŭ perforte kondukas, ĝia venko eblas. Do la politiko, la babilado, la interkomprenemo, la leĝoj, la normoj, la respektemo kaj aliaj similaj stultaĵoj neniom validas. Temas pri la dimensio de la pugnoj. Des pli forte kaj perforte oni batas ju pli ebla estas la venko. Kelkfoje *B* alvenas al la vojo decidi ĉu savos homojn ĉu obeos la leĝon. Ne dubu. Li bone elektas savi homojn, kvankam tia decido maljuste malbonigos sian publikan bildon kaj donos problemojn al ili. La devizo ŝajnas esti "Malgraŭ la homaro, mi savos la homaron".

Graveco de la scienco kaj la tekniko

Pugno estas metaforo. Certe en pluraj filmoj, *B* kaj *MB* babilas pugne, sed plejeble la komunikado okazas per potenchavaj pafoj, kies fulmoj, bruoj kaj detruemaj kapabloj allogas spektantojn. Tia fajrmontrado bezonas altnivelajn teknikojn. Pro tio la filmoj ĉiam bezonas strangajn homojn, kies fako estas la scienco, ĝenerale la fiziko, la biologio aŭ la inĝenierado. Ili, plejofte okcidentaj blankaj viroj, reproduktas la bildon de sciencisto, kies okuloj nur kapablas vidi sian propran laboron, sen ia zorgo rilate al ĝiaj konsekvencoj, krom la simpla flankaro sukceso-fiasko. Pro la kombino de specifa cerbo kaj simpla homo, la paro scienco-tekniko estas sendependa de la etiko. Tiu paro estos bona aŭ malbona depende de la manoj sur kiujn ili metiĝos. Do la batalo inter la Bono kaj la Malbono ankaŭ estas la batalo posedi la sciencon kaj la teknikon. Logike, tia batalo nepre okazu en la dimensio de la perforto. Multaj *ASM* pereos. Sed oni akceptu tion, ĉar neniu monero havas nur unu flankon kaj garantii pacan mondon postulas tian nedeziratajn konsekvencojn.

Ĉio okazas tie... aŭ tie

Estas kvar specoj de landoj en la mondo. La unua grupo estas bona kaj evoluita. Ni parolu pri Usono, kelkfoje Britio kaj malofte aliaj. La dua grupo estas pluraj eŭropaj, kie oni restas en la estinteco, kiel Francio aŭ Italio. Temas pri bonaj kaj evoluitaj landoj, sed iom stultaj. Tie multaj homoj ankoraŭ ne rimarkis, ke la mondo estas malforta en daŭra danĝera situacio, kiu bezonas la sinsekvantan zorgadon de la unua grupo. La Tria estas la landoj de la malbonuloj. Oni facile tion rimarkas danke al la akcento aŭ al la vizaĝo. Malbonuloj, oni ne dubu, estas islamanoj, latinamerikanoj kaj rusoj. Kelkfoje aperas Norda Koreio, eĉ Germanio. Kaj la kvara grupo rolas kiel *ASM*; estas la lokoj kie la homoj mortas pro la malbona agado de la malbonuloj aŭ pro la bona agado de la bonuloj.

Puno kaj vakcinado

Kvankam en la filmoj *B* estas admirata, tie *B* ankaŭ ricevas la miskomprenon de la savotoj. Nur *B* scias precize tion, kio okazas en la mondo, plurfoje iel kaŝita por la ĝenerala popolo, kiu ne havas kapablon tion rimarki. La ĝenerala popolo restas en la surfaco de la okazaĵoj. Ili ne scias pri la vera kialaro, sed malgraŭ tio ili kuraĝas misinterpreti. La vera kialaro temas pri la senfina luktado inter la Bono (kiu produktas heroojn) kaj la Malbono (kiu produktas

La ne dezirataj konsekvencoj de la agado far *B* (kiu ne respektas landlimojn, facile mortigas homojn, detruas multe, malbone kondutas laŭ la lokaj kutimoj ktp) estas la kialo, por ke la ĝenerala popolo en iu momento de la filmo povas malami *B*-on. Sed antaŭ la fino, oni malkovras la kaŝitan informon. Rezulte la vera vizaĝo kaj animo de *MB* klare aperas antaŭ la okuloj de *ASM*, kiu refoje prenas la ĝustan vojon de la admiro.

Tia funkciado vakcinas spektantojn. La reala mondo iel similas. Ĉefe sed ne nur Usono (ankaŭ Britio, Francio, Belgio, Israelo, Rusio ktp) sinprezentas kiel savantoj de la homaj rajtoj, de la evoluo, de la civilizacio. Tia konduto produktas malbonajn

Konsekvencojn kiel la perforte memstarigitan Islaman Ŝtaton en la detruita regiono Irako-Sirio, monstro kiu siavice bezonas la partoprenon de B por la celo savi nin ĉiujn. Do, filmoj instruas pri la veraj fonaj roloj kaj nia dependenco de la savantoj.

Ĉu vi jam havas sufiĉe da unuoj por redakti la sekvantan sukcesan filmon? Ne forgesu iel enmeti iomete da ama historio. Ekzemple: heroo enamiĝis al iu virino *ASM*-ano, kiu mortas pro la agado de *MB*. Ankaŭ sukcesas iom da seksvoka enhavo kiel korpoj, kiuj fidele reproduktas la nuntempan ununuran modelon por viroj (ĉokolada ventro, videblaj muskoloj, bluaj okuloj) kaj virinoj (90-60-90, kun strikta vesto). Ne forgesu nebezona-tajn detruadojn de aŭtoj, surstrataj vendejoj de malriĉaj *ASM*-anoj, eĉ konstruaĵoj.

Do lernu, kolektu milionojn da eŭroj (ĉefe por la nebezona-taj detruadoj kaj la pago de multekostaj aktoroj) kaj prestiĝu por la sukceso. Facila, ĉu?

INTERNACIAJ KONGRESOJ

La Universala Kongreso de Esperanto, organizata de Universala Esperanto-Asocio, okazos ĉijare en Montrealo (Kanado) inter la 6a kaj 13a de aŭgusto. La temo estos “Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj”. Informoj pri programo, aliĝoj, alvenoblecoj kaj multe pli aperas en: <https://esperanto2022.ca/>.

Ankaŭ en Kanado, konkrete en Kebekurbo, okazos la Kongreso de instruistoj de Esperanto, inter la 30a de julio kaj la 6a de aŭgusto, pri la temo “Esperanto en dulingva aŭ plurlingva edukado”.

La Internacian Junularan Kongreson oni celebros en Nederlando, inter la 20a kaj la 27a de aŭgusto.

Por tiuj kiuj ne povos vojaĝi, vi povos partopreni la kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu okazos rete, ĉar laŭplane ĝi devis okazi en Moskvo, sed ĝi estis nuligita pro la militaj cirkonstancoj. La datoj estos inter la 29a de julio ĝis la 1a de aŭgusto, kaj vi povas informiĝi en: <https://www.satesperanto.org/>.



POEZIA ANGULO

Jorge Camacho

Romanco pri la enamiĝinto kaj la morto

La ĉi-sekva traduko de la hispanalingva vokalrima kaj anonima poemo *Romance del enamorado y la muerte* unue publikiĝis ene de mia artikolo *Pokaj belo kaj arto [Nerecenzo pri Belarta rikolto 2020]*, publikigita en *Beletra almanako* 42 (Oktobro 2021, p. 143-154). Ĉi-okaze mi aldonas la originalon por komparo.

Un sueño soñaba anoche
soñito del alma mía,
soñaba con mis amores,
que en mis brazos los tenía.
Vi entrar señora tan blanca,
muy más que la nieve fría.
– ¿Por dónde has entrado, amor?
¿Cómo has entrado, mi vida?
Las puertas están cerradas
ventanas y celosías.
– No soy el amor, amante:
la Muerte que Dios te envía.
– ¡Ay, Muerte tan rigurosa,
déjame vivir un día.
– Un día no puede ser,
una hora tienes de vida.
Muy deprisa se calzaba,
más deprisa se vestía;
ya se va para la calle,
en donde su amor vivía.
– ¡Ábreme la puerta, blanca,
ábreme la puerta, niña.
– ¿Cómo te podré yo abrir
si la ocasión no es venida?
Mi padre no fue al palacio,
mi madre no está dormida.
– Si no me abres esta noche,
ya no me abrirás, querida;
la Muerte me está buscando

Ĉi-nokte mi songis songon,
plej dolĉan songon animan,
mi songis pri la amata,
ŝi en miaj brakoj sidas.
Jen venas blankega damo,
pli blanka ol neĝo frida.
– Kiel vi envenis, kara?
Tra kiu pord', vivo mia?
Ĉiuj pordoj kaj fenestroj
kaj ĵaluzioj fermitas.
– Amant': mi estas ne amo
sed Morto de Di' sendita.
– Aj, rigora Morto, lasu
ke mi vivu tagon plian!
– Unu plena tag' maleblas,
unu vivhoru sufiĉas.
Ege haste li sin vestas,
des pli haste enŝuiĝas;
li rapidas al la strato
kie lia am' rezidas.
– Apertu¹ la pordon, blanka,
apertu ĝin, juna mia!
– Kiel do mi vin enlasu
dum okaz' ne prezentiĝas?
Patro ne iris palacen,
patrino restas vekita.
– Se ne ĉi-nokte, amata,
vi enlasos min neniam;
la Morto mem min serĉadas,

¹aperti: (tr.) malfermi (*Plena vortaro*, 1934, kaj ĉe pluraj aŭtoroj ĝis la apero de “ovri” en la 1970aj jaroj; malgraŭ la rimarkoj en *PIV 2002* kaj *ReVo*, nenio malhelpas transitivecon de “aperti” apud stata signifo de “aperta” simile al “dubi/duba”, “falsi/falsa”, “fiksi/fiksa”, “fuŝi/fuŝa”, “kaŝi/kaŝa”, “konfuzi/konfuza”, “kompliki/komplika”, “korekti/korekta”, “susekti/suspekta”, “veki/veka” k.a.): “Jam la drak’ apertis sian monstran buŝon” (*Johano la Brava*, XXV, trad. K. Kalocsay); “Ĉu volas vi, ke via Bild’ apertas / palpebrojn miajn pezajn lacanokte” (*The sonnets / La sonetoj*, de W. Shakespeare, “soneto 61”, trad. W. Auld); “kaj, dume, ĝue / apertu la okulojn” (Jorge Camacho, *Strangaj spikoj*, 2016, p. 17).

INTERNACIE

Miguel Fernández, en la portugala



Pasintan 18an de majo okazis en Porto la prezentado de *Semente de alvoradas*, portugalingo de la hispanlingva *Semilla de arbol*, de Miguel Fernández, kompilaĵo de elektitaj poemoj de la aŭtoro originale verkitaj en Esperanto kaj hispanigitaj de la poeto mem, kaj eldonita en 2020 de la eldonejo Calumnia.

La elstaran portugalan version faris Carlos d'Abreu, poeto, tradukisto

kaj kunlaboranto ĉe *Centro de Literatura Portuguesa* (Centro pri Portugala Literaturo) de la Universitato de Coimbra. La enkondukon por la portugala eldono verkis Alexia Dotras Bravo, el la sama universitato. Partoprenis la eventon ankaŭ la kant-aŭtorino Ana Ribeiro.



La prezentado okazis en la sidejo de *UNICEPE-Cooperativa Livreira de Estudantes do Porto*, kooperativo de studentoj de Porto, kiu eldonis la libron kune kun *Carava Ibérica*. Dum la prezentado, Miguel ĝuigis la ĉeestantojn per deklamado de poemoj kaj kantoj. Kompreneble, kantis ankaŭ Ana Ribeiro. Kaj en la fino ĉiuj emocie kunkantis *Grândola, vila morena*, simbolo jam de interhoma frateco plej taŭga por tiu frateca renkontiĝo.

Ĉar la prezento okazis ĝuste la tagon de la datreveno de la aŭtoro, oni regalis lin per granda torto kiu surhavis la bildon de la kovrilo. Bone akompanata de la bongustega vino de Porto.

Kara Miguel, ni ĉiuj ĝojas pro via sukceso (prave diras Suso Moinhos, ke ne estas tiom da Esperanto-poetoj, laŭlonge de la tuta historio, kiuj estis tradukitaj en du nacilingvojn), kaj ni gratulas vin duoble, pro via 72a datreveno kaj pro la apero de via poemaro en la portugala.

Ana Manero

TEMPO, HORLOĜOJ KAJ FERVOJOJ

Ĝis la fino de la 19-a jarcento, ĉiu urbo kaj vilaĝo en Hispanio havis sian propran oficialan horon. Tradicie, tiun horon montris la sonorilturo de la ĉefa preĝejo de la urbo. Fine de la 19-a jarcento, ĝuste en la jaro 1884, internacia renkontiĝo en Vaŝingtono aprobis dividi la teran cirkon laŭ 24 horzonoj. Poste, kaj depende de ĉiu horzono, ĉiu ŝtato rajtus aprobi ununuran oficialan horon aŭ sekvi kun propraj horoj por urboj aŭ regionoj. Ĉi tiuj demarŝoj por atingi difinitajn kaj precizajn horojn ŝuldiĝis al fervojista mondo.

En Hispanio, jam en la jaro 1878, la registaro decidis instali videblan horloĝon en ĉiu stacidomo. La horo de eliro aŭ eniro de trajnoj al tiu loko estus anoncita akorde al tiu horo, kvankam verdire diferencoj inter horoj de ĉiu urbo en Hispanio estis sufiĉe grandaj. Ekzemple, inter Korunjo (okcidente de la Ibera Duoninsulo) kaj Barcelono (oriente) ekzistis 42-minuta diferenco, tio estas, kiam en Barcelono estis ĝuste la 12-a horo, en Korunjo estis 12 horo kaj 42 minutoj.



*Ĝis la fino de la 19-a jarcento ĉiu urbo
en Hispanio havis sian propran oficialan horon*

En la jaro 1900, dekreto de la reĝino Maria Kristina ordonis ĝustigi la fervojajn horojn en Hispanio laŭ la horo de la urbo Madrido, do, horloĝoj de ĉiuj hispanaj stacidomoj devis montri la horon de Madrido. Tamen, tio okazigis problemojn, pro la fakto, ke kiam el Barcelono devis eliri trajno je la 12-a horo, laŭ la oficiala horo de Madrido, verdire ĝi eliris je la 11:37 (laŭ barcelona horo), ĉar ekzistis diferenco de 23 minutoj inter madruda kaj barcelona horoj.

Ĉi ĉio solviĝis, kiam la 1-a de januaro de la jaro 1901 Hispanio adoptis oficialan ununuran horon, kiu devis regi la hispanan teritorion en la Ibera Duoninsulo. Vere, la dekreto forĝis difini la horon en la Kanaria Insularo kaj en la afrikaj teritorioj, pro tio, ĝis la jaro 1922 ĉiu kanaria insulo havis sian propran horon. La hispana registaro elektis tiun unuan tagon de la 20-a jarcento por adopti oficialan horon por “preskaŭ” la tuta lando, tiu elektata estis la tiel nomata: *tempo de Okcidenta Eŭropo*. Alia grava decido rilate horojn, kiu ekvalidis tiu unua tago de la nova jarcento, estis la divido de tago laŭ 24 horoj. Ĝis tiam, horoj simple estis nomitaj kiel *la 1-a / 12-a antaŭtagmeza* aŭ *la 1-a / 12-a posttagmeze*. Ekde tiam, kaj nepre por fervojoj, posttagmezaj horoj estus eldiritaj kiel “*la 13-a / 24-a horo*”. La unuaj horloĝoj kiuj uzis tiujn novajn ciferojn estis tiuj instalitaj ĉe la stacidomoj. Do, por montri antaŭtagmezajn horojn oni uzis romiajn ciferojn en nigra koloro; alie, posttagmezaj horoj sur la stacidomaj horloĝoj aperis ruĝkoloro laŭ arabaj ciferoj. Do, horoj en Hispanio unuiĝis pro fervojaj kialoj.



Antikva horloĝo ĉe stacidomo

Kaj pro kio okazis ĉi tiuj ŝanĝoj? Ĉu horoj montritaj de sonorilturoj en preĝejoj jam ne estis taŭgaj por mezuri la tempon? Nu, kiel dirite, tiuj ŝanĝoj okazis por reguli pli ekzakte la eliron de trajnoj. Tiel, estis necese informi kiel eble plej taŭge al vojaĝantoj pri eliroj kaj alvenoj. Same, la hora ĝustigo en fervojoj devas esti tute ekzakta, pro la fakto ke trapaso de du trajnoj en konkreta loko je la sama horo, sur sama relo, kaŭzus teruran akcidenton.



Belega poŝhorloĝo uzita de fervojisto.
Muzeo pri Fervojoj en Madrido

De tiuj jaroj tempo, horloĝoj kaj fervojoj estas ligitaj aferoj. Ni sciu, ke brakhorloĝoj ne ekzistis en tiuj jaroj kaj poŝhorloĝoj estis kvazaŭ luksa objekto. Por havigi ekzaktan tempo-kalkulilon al fervojistoj, fervojaj kompanioj en tiuj jaroj donis poŝhorloĝon al siaj laboristoj, kiuj devis transdoni ĝin al sekvanta laboristo kiam la deĵoro finiĝis. Aliokaze, fervojaj kompanioj nur dungis tiujn laboristojn kiuj jam posedis poŝhorloĝon, do, estis necese disponi pri tiu luksa objekto se oni deziris labori kiel fervojisto.



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj
<https://hafe-19.websself.net>

TITO BRANDSMA, UNUA ESPERANTISTO SANKTULO



Ekde la 15-a de majo, kiam sole-
ne en Vatikano, Papo Francisko,
proklamis sanktulon, al beato Tito
Brandsma. Esperanto, inter perso-
noj de la plej multnombraj profesioj,
havas ankaŭ novan sanktulon. Ni konis,
ĝis nun, la grandan rilaton al esperanto
de Sankta Maximiliano Kolbe kaj pli proksime,
de Papo Sankta Johano Paulo la 2-a.
Sed veran esperantiston, kotizantan,
ni ne havis.

Tito Brandsma (Anno Sjoerd Brandsma) naskiĝis la 23-an de februaro de 1881 en Bolsward (Nederlando), ene de katolika familio, kaj forpasis en la koncentrejo de Dachau la 26-an de julio de 1942, mortigita de nazioj pro la faktoj esti karmelana sacerdoto kaj esti granda opoziciulo kontraŭ la nazia ideologio. Tito Brandsma eniris en la Karmelanan Ordenon en 1898, studis Filozofion en Romo kaj estis profesoro en pluraj fakultatoj de Nederlando.

Vere oni povas diri ke li estis instruisto, verkisto, tradukisto (ĉar li parolis plurajn lingvojn, krom Esperanto) kaj ĵurnalisto. En 2005 li estis elektita de la loĝantaro de Nimega kiel plej elstara Civitano en la historio de la urbo, ĉar li estis fondinto de la tiea Universitato (nuntempe Universitato Radboud), kie jarojn poste, li estis elektita Rektoro. Li laboris kiel ĵurnalisto kaj eklezia konsilanto en pluraj katolikaj ĵurnaloj kie li defendis ideojn kontraŭ la nazia ideologio. Pro tio, li estis arestita en 1942 kaj post esti en prizonoj de Scheveningen, Amersfoort kaj Cleveris, li forpasis en la koncentrejo de Dachau la 26-an de julio de 1942, per letala injekto.

Al prizono de Scheveningen li nur povis kunporti du librojn, tamen li, per lia granda memoro sukcesis verki plurajn verkojn, en nederlanda, hispana kaj esperantaj lingvoj, kiel “*Taglibro de prizonulo*”, kaj multajn poemojn, kelkajn en esperanto, kiel “*Antaŭ la bildo de Jesuo*”.

Li okupis la ĉelon 577 kaj dum lia restado tie li multe laboris, ĉar al kutimiĝinta al aktiveco, li decidis organizi kaj verki. Li verkis “*Mian horaron kaj ĉelon*” kie li priskribas la ĉelon, ĉar kiam li eniris tien, la unua afero por li estis “dekoracii” sian vitalan spacon, ĉefe per religiaj bildoj. Li daŭrigis la laboron komencita antaŭ eniri en malliberejon pri “*La vivo de Sankta Tereza*”, kaj oni devas elstari ke la unuaj verkoj estas skribitaj en normalaj folioj, eĉ enhavante la leterfronton de la prizono, sed poste ŝajnas ke oni malpermesis al li uzi tiujn paperojn, kaj li devis verki skribante inter linioj de aliaj skribaĵoj. Oni konservas kelkajn el tiuj laboroj ĉar Tito Brandsma donis al kelkaj kamaradoj en la prizono ekzemplerojn kiuj nuntempe estas gardataj, kiel relikvo en la nederlandaj Karmelanoj.

Sed la plej elstara afero estas por ni ke , kiel granda idealisto, laŭ ni scias per la esperantisto Pastro Casanoves, de la klaretana ordeno, kaj per la Jarlibro de IKUE, kies unua numero aperis en 1926, kaj tie lia nomo jam estis listigita, ke li estis membro kotizanta de IKUE (Internacia Katolika Asocio) ekde 1926 ĝis 1938,. Dum aŭgusto de la jaro 1911 Hago gastigis la 2-an IKUE Kongreson kie li eniris en la komisionon por verki eklezian radikaron. Krome, la 20-an de aprilo de 1913, okaze de la 4-a renkontiĝo de la Nederlanda Katolika E-Ligo, en Hertogenbosch li celebris la meson, kaj poste, en 1934, li estis inter la organizantoj de kongreso, kaj ankaŭ li estis inter la partoprenantoj en la IKUE Kongreso en Hago, en 1937.

Verŝajne li ĉiam partoprenis en pluraj publikaĵoj kaj konis plurajn tradukaĵojn al esperanto ekde pluraj lingvoj, ĉar li estis vera poligloto, kiel pruvas, la tradukon de la verkoj de Sankta Tereza de la hispana lingvo al la nederlanda. Tiel, kiam li skribas pri pluraj konferencoj disdonitaj en Usono pri Lorenzo de la Resurrección kaj lia verko “*La praktiko de la ĉeesto de Dio*” profesoro Brandsma klarigas ke “la libro estis tradukida al pluraj lingvoj, inter ili Esperanto”.

Do, ni esperas ke la nova sanktulo helpos la esperantistaron.

M. Rafaela Urueña

lom da matematiko (7) ...

Ĉu eblas la ekzisto de King Kong?



En multaj hollywoodaj filmoj aperas estaĵoj, kiuj restas portempe en nia memoro kaj eĉ timigis nin pro ilia grandeco kaj emo ataki homojn: grandaj simioj kiel “King Kong”, gigantaj araneoj, male-taj skorpioj, sovaĝaj grandenverguraj birdoj, ktp.

Eble iam vi demandis al vi ĉu eblas la ekzisto de tiaj estaĵoj en la reala mondo. Respondo al tiu demando ekzistas kaj estas tre simpla: NE.

Jam Leonardo da Vinci (XV-XVI jarcento) pruvis tiun neblon.

Ni komencu per kelkaj konsideroj de elementa geometrio:

Estas sciate ke ni vivas en tridimensia mondo, n o m e , longeco, largeco kaj alteco.

2. Se ni konsideras nur unu dimension, ni parolas pri longeco. Ĝi estas mezurata per metroj.


3. Se ni konsideras dudimensian objekton, ni parolas pri surfaco. Ĝi estas mezurata per kvadrataj metroj.

Se ni konsideras tridimensian objekton, ni parolas pri volumo. Ĝi estas mezurata per kubaj metroj.






$$L = 1$$




$$L = 2$$

Nun ni imagu ke ni mezuras linion 1-metran kaj ke ni duobligas ĝin. La nova linio mezuros duoble ol la unua: ĝi estos 2 metra.

Se ni konsideras dudimensian objekton, ekzemple kvadraton, kies randolinio mezuras 1 m. kaj ni duobligas tiun randolinion, la kvadrato (surfaco) ne duobligas, sed kvarobligas.



$$S = 1 \times 1 = 1$$



$$S = 2 \times 2 = 4$$

Kaj se ni konsideras objekton 3-dimensian, ekzemple kubo, kaj duobligas ĝiajn randoliniojn, la kubo (volumo) ne duobligas; ĝi 8-obligas.

Nun ni reiru al la komenco de tiu ĉi artikolo kaj ni supozu ke ekzistas besto kiel King Kong kaj ke ĝi estas proporcia al homo, ekzemple 12-oble pli granda ol homo laŭ la 3 dimensioj: 12-oble alta, 12-oble larĝa kaj 12-oble longa.

La pezo de tiu besto, kiu dependas de ties volumo, ne estus 12-obla kompare al tiu de la homo, sed laŭ la antaŭa rezonado, ĝi estos $12 \times 12 \times 12 = 1728$ -obla.

Alie, nian korpon subtenas niaj kruroj. Kaj la kapablo de la kruroj subteni la korpan pezon dependas de ilia dikeco, t.e., de ilia sekcio, same kiel dika ŝnuro estas pli rezista ol maldika.

Sed la dikeco de la kruroj de King Kong kreskus nur ĝis $12 \times 12 = 144$ -oble kompare al tiu de homaj kruroj.

Do, la dikeco de la kruroj de King Kong 144-obligus, dum ĝia pezo (ĝia volumo) 1728-obligus. Tio signifas ke la kruroj de King Kong devus subteni pezon 12-oblan ol tiu, kiun devas subteni la kruroj de homo. Sekve, la pezo de King Kong rompus ĝiajn krurojn.

Se ni rigardas la Naturon, kiu estas la besto plej granda nun ekzistanta? Baleno. Pli precize, la blua baleno. Ĝi estas tiel granda, do tiel peza, ke nur povas vivi en la oceano, tie kie ĝia korpo estas malpli peza, ĉar en akvo estas forto, kiu ĝin puŝas supren. Kiam baleno surstrandiĝas ne mortas, kiel la fiŝoj, pro la nekapablo enspiri aeron (balenoj estas mamuloj, kiuj enspiras kiel ni), sed interne dispremita de ĝia propra pezo.

Alia ekzemplo, nun surtera: la plej peza besto eble estas hipopotamo. Ĝiaj kruroj estas ege dikaj por subteni grandan pezon; eĉ granda parto de ĝia vivo disvolviĝas en akvo, kie la pezo estas pli malgranda (etimologie, la nomo de tiu besto signifas rivera ĉevalo).

Jesús M. García Iturrioz
jmgiaa@hotmail.com

HEK
2023
SEVILO